

Kluba Programo:**julio:**

- 7 Literatura vespero - IBIS
- 14 John Wells – Lingva Seminario – Diorama (1800h: konsilantaro)
- 21 Ŝatataj Partoj de Esperantologio - IBIS
- 28 Ludvespero – gvidata de Matt Peperell – Diorama

aŭgusto:

- 4 Literatura Vespero - IBIS
- 11 Arturo Prent – La Estonteco de la Fervojoj en Britio – Diorama (18:00h: konsilantaro)
- 18 Kunportu mallongajn poemojn (aŭ ĉerpaĵojn) – IBIS
- 25 Filmo – Mefisto (parto 1) – Diorama

septembro:

- 1 Diskutvespero (temo decidota) – IBIS

Esperanta Kalendaro:

22-29 julio: Universala Kongreso de Esperanto, Seulo, Sud-Koreio. www.uea.org/kongresoj


30 jul-4 aŭg: SAT-kongreso, Seulo, Sud-Koreio <http://sat90.org>

Aliaj anoncoj:

Legu la artikolon pri “Esperanto and its links to Wimbledon” fare de Bill Chapman, publikigita dum junio en www.wimbledonsw19.com. Klaku “Search Wimbledon” kaj tajpu “Esperanto”.

Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.

Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 12a aŭgusto por mencio en la sekva Kluba Bulteno.



25 aŭgusto:

prezento de la Esperantlingva filmo “Mefisto” ĉe Diorama.

La germanlingva originalo de 1981 estas modernigo de la mezepoka Faŭst-legendo, al la nazia epoko. Anstataŭ scivorema erudiciulo, la protagonisto estas ambiciega aktoro. Mefisto gajnis interalie Oskar-premion por plej bona fremdlingva filmo.

KER ekzameno

La 10-an de junio okazis la 6a tutmonda ekzamena sesio de KER, kaj Londono partoprenis. Ankaŭ lastan jaron, okazis KER ekzamena sesio en London, do Londonaj Esperantistoj povas fieri, ke KER ekzamena sesio iĝas regula okazo en Londono!

La KER ekzameno konformas al la postuloj de la Konsilio de Eŭropo, kaj do la atestiloj estas oficiale agnoskataj. La agnoskiteco de la atestiloj estas grava, ĉar ĝi donas al spertaj Esperanto-parolantaj la saman respekton, kiun oni donas al parolantoj de aliaj lingvoj. Ekzemple, la nivelojn de la KER ekzamenoj komprenas dungantaj firmaoj. Jam estas 1851 diplomitoj, kaj ni esperas, ke ni baldaŭ pligrandigos tiun nombron!

Membroj de LEK organizis la Londonan sesion, kaj ekzameniĝis kandidatoj ne nur el Londono, sed ankaŭ el aliaj partoj de Britio, kaj eĉ el Irlando. Entute, sep kandidatoj ekzameniĝis. Dankon al Renato, Marteno, kaj Lenio pro ilia laboro, kaj bonŝancon al niaj kandidatoj!

Christopher Lewis

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:
Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street,
NW1 3FE (por kunveno kun programo);
Hotel Ibis, 3 Cardington Street, NW1 2LW (por
babilvespero)

Kutima programo ĉe Dioramo:


18:00 malfermiĝo kaj bonvenigoj

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la
ĉefprogramero

22:00 fino



Loko:

Metrostacio: Euston, Warren St (Victoria linio)

Euston Square (Circle linio)

Fervojo London Overground: Euston

Busoj: 10, 14, 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205,
390; krome: 453, C2 (Dioramo); 59, 68, 91, 168,
253, 476 (Ibis).

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo
020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: Roy Simmons (vidu supre);

Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West
Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779
yarrump@gmail.com.

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honora Vicprezidanto: Heleno Fantom;

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Antony Rawlinson (Bultenisto), Renato Corsetti, Roland England, Stan Keable, Chris Lewis, Anna Lowenstein, Terry Page

Adresoj: David Thornell: lek.sekretario@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ

ap_esp-lek21@yahoo.co.uk, Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry_page@btinternet.com,
anica_page@btinternet.com, Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.

Letero de nia

Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Oni certe rimarkas, kiel vigla estas la nunaj agoj de la Londona Esperanto-Klubo. Ni allogas komencantojn kaj progresantojn al klasĉambraj lecionoj. Niaj anoj memfide ekzameniĝas. Niaj kunvenoj inspiras ĉiujn partopreni, ĉu ĉe Diorama ĉu ĉe Ibis. Ni planas ekskursi. Ni dividas diversajn dokumentojn inter ni – jen revuojn jen klasikaĵojn jen memverkitajn ŝercojn. Nin vizitas kelkfakaj eksterlandaj profesoroj, plenaj je entuziasmo kaj sperto. Ni varbas novajn membrojn. Jen kia ni estas. Jes ja. Ni fieru do.

Parolante pri fiero, nepre ne forgesu reveni de viaj someraj ferioj kun raportoj, broŝuroj, turismaĵoj kaj fanfaronoj. Viajn samideanojn en Londono ĉiam kaj ĉiel interesos viaj aventuroj tra Esperantujo. Tiaj vojaĝoj kaj renkontiĝoj (etaĵ kaj egaj) konsistigas trezoraron por ni ĉiuj. Tial, memoru ĉion, por prezenti poste al LEK!

Feliĉan Someron!

David Thornell

LA ESTONTECO DE LA FERVOJOJ EN BRITIO

(Vidu la Kluban Programon por 11 aŭgusto)



fermo de novaj aŭ fermitaj vojoj.

Kiel progresos tiuj ŝanĝoj? Kiom kostos? Kiaj estos la horaroj, kaj aliaj aspektoj kiujn la publiko rekte spertos? Kiel evoluos la konservitaj (precipe turistaj) fervojoj?

Arturo Prent

